1/2020

Januaro
Februaro

ISSN 0032-2431

# Pola Esperantisto

## Revuo de Pola Esperanto-Asocio




★ Historio de rubaĵoj
★ Jean Forge aŭ Jan Fethke
★ Collegium Maius de la Jagelona Universitato

**Pola Esperantisto**
Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

**Eldonanto**
Pola Esperanto-Asocio
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a
00-159 Warszawa
http://www.esperanto.pl

**Ĉefredaktoro**
Robert Kamiński, rk-lodzo@wp.pl

**Kunlaboro**
Teresa Nemere, Magdalena Tatara,
Adam Wilkus,

**ABONOJ**
La abono por 2020 - por 6 numeroj (papera):
Pollando - 50 zlotoj
eksterlando - 20 eŭroj
Cifereca (pdf)
Pollando - 25 zlotoj
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:
PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002
swift INGBPPLPW
La mendon provizu per informo, al kiu adreso estu sendata la revuo.

**ATENTO**
Abonoj per eŭroj validas post aldono de bankaj kostoj.
Polan Esperantiston eblas aboni per Konto de PEA en UEA: peaa-v;
Detaloj troviĝas ĉe:
https://uea.org/alighoj/pagmanieroj
kaj https://uea.org/alighoj/spagilo

Presejo
BŁĘKITNE STUDIO
ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

**Estraro de PEA**
Robert Kamiński - prezidanto
Agnieszka Mozer - vicprezidanto
Zofia Śmistek- sekretario
Alina Mozer - kasisto
Marek Mazurkiewicz - estrarano

**Ĉefdelegito de UEA**
Stanisław Mandrak:
stanislaw.mandrak@gmail.com

**Peranto de UEA**
Jan Skonieczka: jaskon@op.pl,

Pri la skribitaj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La redakcio rezervas al si la rajton mallongigi kaj korekti la tekstojn. Represo kaj tradukoj nur kun indiko pri la fonto

**Pola Esperanto-Asocio**
Polski Związek Esperantystów

Fronta kovrilpaĝo - Zofia Kowalczyk kun Bartosz Mirocha, Gabrysia kaj Piotruś el Bielsko-Biała

Enhavo


Redaktoraj vortoj ........................................................................................................ 2

Estraro informas

*Robert Kamiński,* Ne forgesu ĉi-jare subteni la Polan Esperanto-Asocion .................... 3

*PEA-estraro,* Germana-Pola Esperanto-Kongreso 2020 ....................................................... 5

Eventoj

*Robert Kamiński,* Ĉu la homaro povas paroli unu lingvon? - prelego en la muzeo „Polin" ........................................................................................................ 5

*Adam Wilkus,* La novjara E-renkontiĝo en Bielsko-Biała ..................................................... 6

*Irek Bobrzak,* Vintra Renkontiĝo de "Wikimedia Polska" ..................................................... 8

Mojose

*www.pej.pl,* PEJ-semajnfino en Triurbo! ........................................................................ 12

*Tyron Surmon,* Neĝkovrite en Pollando ........................................................................ 12

Raportoj, rakontoj

*Robert Kamiński,* Parolantaj poŝtmarkoj ........................................................................ 14

*Robert Kamiński,* Malfacila problemo - nekropoloj de la estonteco .............................. 16

Pri kio ni aŭdas

*Evelyne Rotellini,* Imitinda agado – Esperanto Plus ........................................................ 19

*Robert Kamiński,* Historio de rubaĵoj (unua parto) ............................................................ 20

*Robert Kamiński,* Solaris kaj Pirx - „polaj" stelo kaj planedo! .......................................... 23

*uea.org,* Deklaro de UE okaze de la 75-a internacia datreveno de la holokaŭsto ... 25

Vizitindaj lokoj

*Lidia Ligęza,* Collegium Maius de la Jagelona Universitato en Krakovo ..................... 26

Homoj

*Roman Dobrzyński,* Jean Forge aŭ Jan Fethke ................................................................. 30

*Robert Kamiński,* Adiaŭo de d-ro Józef Dąbrowski ......................................................... 33

Lingvoscienca angulo

Plena Manlibro de E-a Gramatiko, Rolvortetoj *De* rilate al verbo – dua parto ......... 33

*Roman Dobrzyński,* Politiko en gramatiko ........................................................................ 34

Literaturaĵoj

*Viktor Lagutin,* Bjalistoka fantazio ........................................................................ 37

Leterkesto

*Łukasz Żebrowski*, Manĝi en varsovia "Manĝo" ................................................................ 39

Peto de Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto .............................................. 40

Kalendaro 40

Gazetaro pri E-movado

Pola Radio pri L. Zamenhof ........................................................................................ 42

Forpasis

Gertruda Zofia Kowalczyk, Sławomir Sąsiadek, Józef Dąbrowski, ................................ 43

El la fotogalerio de Andrzej Sochacki

*Andrzej Sochacki*, La 3-aj Esperantaj Tagoj en Staszów, 05-07.05.1989 ...................... 44

Korekto ........................................................................................................ 47

# Redaktoraj vortoj

Estimataj legantoj

Jam komenciĝas la nova eldonjaro de nia revuo. Kiom longe ĝi estas eldonata? La unua numero aperis en la jaro 1905 kaj dum la 115-jara eldonperiodo la revuo havis diversajn, pli aŭ malpli, konatajn redaktorojn kaj kunlaborantojn, inter ili ankaŭ familianojn de L. Zamenhof. Unu el la fondintoj estis Leono Zamenhof kaj la unuaj numeroj aperis en Lwów (nuna Lvivo). Kelkajn jarojn poste, la redakcio translokiĝis al Varsovio kaj de tiam, "Pola Esperantisto" aperadis regule. La eldonadon rompis nur la unua kaj la dua mondmilitoj kaj stalinisma epoko.

Oni povas multe rakonti pri la riĉa historio, sed, la plej grava estas tio, ke la revuo, posedanta belan historion, aperadas ĝis nun. Feliĉe, post historiaj meandroj aperis esperantistoj, kiuj volis kaj plu volas daŭrigi la eldonadon. Ĝi aperadis en diversaj formoj kaj varia eldonkvanto.

Hodiaŭ, en la epoko de elektronikaj medioj, „Pola Esperantisto" aperas en ĉiu dua monato presforme kaj ankaŭ en la elektronika formo. La redakcio strebas plu prezenti Esperantan kulturon, informi pri ĝiaj sukcesoj kaj problemoj. Ni informas pri la pola Esperanto - movado, kompreneble ne nur pri la pola. Grava ĉapitro, nome Kalendaro, informas pri eventoj en la pola Esperantujo. Alia konstanta rubriko prezentas novajn Esperantajn eldonaĵojn, kiuj plej ofte aperas en la urboj Świdnik kaj Białystok (Bjalistoko). Krome, inter la paĝoj vi povos trovi informojn pri vizitindaj lokoj en Pollando kaj pri teknikaj novaĵoj el rapide disvolviĝanda mondo. La redakcio volonte prezentas ankaŭ artikolojn pri diversaj temoj, verkitaj de niaj legantoj. Tia verkado estas bona okazo por ekzercado kaj plibonigado de la lingvouzo.

En la nuna numero i.a. ni prezentas malfacilan temon de la entombiga problemo, grava por nia kulturo kaj estonteco. Nia la plej eminenta kunlaboranto Roman Dobrzyński ofte rakontas pri famaj esperantistoj, nun pri Jan Niecisław Baudouin de Courtenay kaj Jerzy Fethke. Vi legos ankaŭ pri tre grava problemo de nia civilizo, kiu nomiĝas rubaĵoj. Serĉu ankaŭ aliajn interesajn temojn.

Okaze de tiu malgranda jubileo de nia revuo, mi volas danki al kelkaj personoj, dank` al kiuj nia revuo daŭre aperas. Ĉefe al Teresa Nemere, kiu kunredaktas kaj korektas la enhavon, al ĉiuj, kiuj verkas kaj provlegas, inter ili al Roman Dobrzyński, Adam Wilkus, Andrzej Bach, Jerzy Dryja, Magdalena Tatara, Irek Bobrzak kaj aliaj. Nun danke al nia kumuna laboro ni povas daŭrigi vivon de nia revuo.

*Robert Kamiński*

# Estraro informas

*Robert Kamiński*

## Ne forgesu ĉi-jare subteni la Polan Esperanto-Asocion

Ĉiuj scias, ke la organiza agado kaŭzas kostojn. Esperantistaj organizaĵoj ĉiam sentas tiun problemon. Ni, estraranoj, laboras senpage, sed por aliaj aferoj oni devas pagi. Temas pri printado de E-informiloj, energio, korespondado ktp. Varsovia Filio de PEA havas propran sidejon. Lukostoj estas altaj kaj ne sufiĉas por tio tre altaj membrokotizoj en la varsovia filio. La propra sidejo (kun E-biblioteko) estas tre grava. Ĝi servas ankaŭ por la Ĉefa Estraro kaj por Pola Esperanto-Junularo. Eksterlandaj gastoj ofte estas akceptataj ĉe la strato Andersa en Varsovio. La organizaĵo devas havi almenaŭ unu reprezentan sidejon, kiu permesas serioze trakti ĝin. La Ĉefa Estraro kaj varsoviaj esperantistoj ĉiam klopodas trovi monhelpon. Ni trovis kaj praktikas du efikajn manierojn por la monsubteno.

La unua preferinda maniero, kiel akiri 1% de nia imposto por la Pola Esperanto-Asocio estas helpo per la fondaĵo FaniMani. Tiu maniero estas efika kaj per ĝi en la jaro 2019 PEA ricevis 976 zlotojn.

FaniMani Fondaĵo havas la statuson de OPP – Organizo de Publika Utilo (Organizacja Pożytku Publicznego). Plenumante siajn statutajn celojn ĝi apogas neregistarajn organizaĵojn kaj lernejojn, kolektante monon por ilia statuta agado. La fondaĵo ebligas al ĉiuj registritaj en FaniMani organizaĵoj (kiuj ne havas la statuson de OPP), uzi 1% de imposto, kolektita de la Fondaĵo FaniMani.

FaniMani Fondaĵo prenas neniujn kotizojn. Transdono de la kolektitaj financoj al organizaĵoj okazos la 31-an de aŭgusto 2020 (supozante ke la Fisko-Oficejo realigos la pagojn por 1% de la detalaj celoj ĝis la fino de julio 2019).

Jen simplaj paŝoj por provizi unu procenton por PEA.

- En deklaro PIT-37, en la kampo 132, skribu **“KRS: 0000507234”**

(se jam tie estas iu KRS, forstreku ĝin kaj subskribu apude)

• En la kampo 134 skribu **"Fundacja FaniMani"** kaj la kodon de la detala celo **"22781"** (se tie jam ekzistas nomo de alia organizaĵo, forstreku ĝin kaj subskribu. Ne skribu nomon de PEA, nur kodon de nia organizaĵo). La kodo 22781 estas registra kodo de PEA en la fondaĵo FaniMani.

Se vi jam sendis vian deklaron al Fisko-Oficejo, vi povas sendi ĝin denove. Vi nur devas, en la kampo 10, signi per kruceto kvadraton n-ro 2 "korekta" kaj korekti nomon de fondaĵo, KRS-numeron kaj la detalan celon laŭ la supra priskribo.

**Dua maniero** estas lerta aĉetado per interreto. Mono, kolektata tiamaniere, ne estas impona, sed **ĉiu helpo estas tre grava**. Enreta aĉetado fariĝis tre populara kaj ofta – preskaŭ ĉiutaga. Aĉetante en 1030 enretaj butikoj vi povas mone subteni Polan Esperanto-Asocion. Kiel fari tion? Maniero estas tre simpla. Aĉetu ion helpe de la retejo https://faniMani.pl. Ĝis 2.5% de la kvanto de aĉeto estos akreditata, kiel donaco, al la PEA-konto.

**Jen kvar simplaj paŝoj:**

1. Venu al retejo www.fanimani.pl
2. Registriĝu en la retejo.
3. Elektu helpon por Polski Związek Esperantystów.
4. Aĉetu ion. Se vi la unuan fojon aĉetas en elektita vendejo, vi devas registriĝi en la vendejo.

Inter retvendejoj vi povas trovi: Allegro, RTV-AGD, LOT, BookingCom Flixbus kaj centojn da aliaj.

**Ĉu vi memoris reaboni "Polan Esperantiston" en 2020?**

*PEA-estraro*

## Germana-Pola Esperanto-Kongreso 2020

En lasta numero de "Pola Esperantisto" ni promesis skribi pri kongresa programo. Bedaŭrinde preciza programo ankoraŭ ne estas preta. Mi proponas mem kontroli en la kongresa retejo ĉu ĝi jam aperis. Certe ni povas prezenti la programon en venonta numero de PE. Nun ni prezentas esperantistojn, kiuj proponis al LKK siajn prelegojn aŭ estis invititaj al la kongreso: Goro Christoph Kimura, Tomasz Chmielik, Zlatko Hinšt, Manfred Trenne, Jürgen Kurtz, Guido Brandenburg, Detlef Mahlzahn, Petro Chrdle, Fritz Wollenberg, Nicolas Gaufillet, Eduard Werner, Seán Ó Riain, Ulrich Lins, Irek Borzak, Robert Kamiński, Roman Dobrzyński, Elżbieta Karczewska, Przemysław Wierzbowski.

**Kongresa retejo:**
**https://www.esperanto.de/eo/enhavo/programo-7**

# Eventoj

*Robert Kamiński*

## Ĉu la homaro povas paroli unu lingvon? – prelego en la muzeo „Polin"

La 14-an de decembro 2019, en la Muzeo pri Historio de Polaj Judoj „Polin", okazis prelego de prof. Federico Gobbo el la Universitato en Amsterdamo, kiu prezentis bazajn informojn pri la projekto de Zamenhof kaj klarigis, kial ĝi tiel allogis pionirojn de Esperanto. Li ankaŭ konsideris la instigojn de nuntempaj parolantoj de la lingvo kaj la aspirojn de esperantistoj. La lingvo Esperanto, ofte prezentita kiel utopia ideo de la 19-a jarcento, travivis du mondmilitojn kaj sukcesis trovi sian lokon en la interreta epoko.

Kial Ludwik Zamenhof decidis dediĉi sian vivon al promocio de sia lingva projekto? Kiel li sukcesis krei stabilan komunumon de homoj, kiuj parolas Esperanton?

Prelegon en la angla en pdf-formato oni povas trovi en retejo de la muzeo: https://www.polin.pl/pl/wydarzenie/czy-ludzkosc-moze-mowic-jednym-jezykiem.






*Adam Wilkus*

## La novjara E-renkontiĝo en Bielsko-Biała

Dimanĉe, la 19-an de januaro 2020, post la semajnfina vagado tra neĝkovritaj pintoj de la najbara Beskidy-montaro, mi venis al la urbo Bielsko Biała, por ĝui la novjaran renkontiĝon de esperantistoj,

La aranĝo komenciĝis per la esperantlingva sankta meso, gvidata de la pastro Roman Gmyrek en la loka katedralo. La ĉefa parto de la renkontiĝo okazis en la kulturdomo „Włókniarz”, nomata tiel omaĝe al laboristoj de la tekstilindustrio, pri kiu la urbo estas fama. La renkontiĝon inaŭguris Bożena Gierula, la estraranino de la E-klubo en Bielsko-Biała. Ŝi bonvenigis ĉiujn kaj dankis al Barbara Śliwińska-Jacyków, la direktorino de la kulturdomo, pro ŝia helpo por la loka E-klubo.

En la granda salono kelkdek geesperantistoj ĝuis la belan koncerton de la montarana ensemblo „Beskidek”, gvidata de Ilona Stolarek. La junulara ensemblo ludis diversajn instrumentojn, interalie sakŝalmon, violinon, kontrabason kaj kantis popolajn kaj kristnaskajn kantojn. La aŭskultantaro aktive partoprenis en la kantado. Diversaĝaj partoprenantoj de la renkontiĝo (ankaŭ infanoj kaj junularo), kiuj venis el diversaj urboj, bondeziris feliĉan novan jaron, dividiĝis per oblato kaj babilis gustumante kukojn, fruktojn kaj aliajn bongustaĵojn.



Oni enmanigis diplomon por la tre aktiva samideano kaj kunlaboranto Zdzisław Grajcar el Cieszyn, okaze de antaŭnelonge festata 60-jariĝo de la Esperanto-klubo en Bielsko-Biała. Kun la granda intereso mi rigardis kronikon de la E-klubo, dokumentanta eksterlandajn vojaĝojn de klubanoj, kiuj partoprenis, interalie, Universalajn Kongresojn de Esperanto kaj lokajn esperantistajn aranĝojn, ekzemple: la tradician renkontiĝon ĉe la montopinto Granda Ĉantorio, apud la landlimo de tri landoj, kaj pilgrimadon tra la montaro al la sanktejo kun akvofonto en Szczyrk-Górka.

En la najbara salono oni prezentis la novan fotoekspozicion pri vojaĝoj de esperantistoj, preparitan de Krystyna Zgud. La prezentitajn fotojn oni faris en diversaj landoj, interalie en Polinezio, Jordanio, Dubajo, Singapuro, Rusio, Italio, Finnlando, Pireneoj, Andoro kaj Slovenio.

Ni kune kantis kristnaskajn kantojn en Esperanto gvidantaj de Roman Gmyrek kaj Mariusz Żak, kun akompano de la samideanino Jadwiga Żebrok, kiu bele ludis pianon. La partoprenantoj ricevis esperantlingvajn kalendarojn por la 2020-a jaro. La renkontiĝo havis riĉan programon, sed la tempo kuris rapide kaj tiuj, kiuj venis el malproksimaj urboj, baldaŭ devis adiaŭi, hastante por kapti trajnon, veturiganta ilin hejmen.

Resume, tio estis tre agrabla, novjara renkontiĝo, ĝi impresis min pro la altkvalita programo kaj agrabla etoso. Kun plezuro mi ĝuis pasigi la tempon tie kune kun samideanoj.



Oni povas rigardi ankaŭ aliajn fotojn ĉe: https://photos.app.goo.gl/7SNC4guNMNgUdmJD9

---

*Irek Bobrzak*

# Vintra Renkontiĝo de "Wikimedia Polska"

Disvastigo de informoj pri Esperanto, ekde komenco, estas kutimo de nia movado, se mi ne diru, eĉ statuta principo, se temas pri agado de E societoj aŭ asocioj. La unua, kiu donis la ĝustan ekzemplon en Varsovio, estis, kompreneble, Ludoviko L. Zamenhof mem. Pli aŭ malpli sukcese sekvis lin multaj aliaj, kvazaŭ disĉiplaj, generacio post generacio, dank' al kio, pli ol jarcenton poste, popularigas Esperanton kaj ĝian kulturon ankaŭ ni. Do, indas memori pri niaj antaŭuloj, ĉiam kaj ĉe ĉiu okazo, ĉar sen ilia aktiveco la lingvo, en kiu mi turnas min nun al vi, simple ne ekzistus. Meritas ankaŭ daŭrigi la penadon, por ke, post la sekvaj centjaroj, iu alia skribu samsignifan konkludon. Do, en Varsovio, la urbo kie "En la mondon venis nova sento", ni aliĝas regule al eventoj, organizataj de la urbo-kvartaloj aŭ de la urbo mem. Dum la Tagoj de Muranów, Internacia Tago de Olduloj aŭ la plej granda kaj fama el ĉiuj Scienca Pikniko, videblas ankaŭ niaj standoj kun flagoj, balonoj, flugfolioj, afiŝoj, ekspozicio de libroj, revuoj kaj volontuloj, pretaj respondi al ĉiuj demandoj. Invitataj, ni venas al

lernejoj - lernejanoj, eĉ skoltoj, aperas en nia sidejo, kaj ne nur. Ĉiam io okazas ĉi-teme. Ekzemple, komence de la jaro, aperis iom surpriza, sed interesa propono, flanke de la vikipedia medio, prezentiĝi dum la Vintra Renkontiĝo de la asocio "Wikimedia Polska" (Vikimedio en Pollando), kun alloga ideo sin ekkoni kaj, se nur eblas, integriĝi. Post nelonga cerbumado, kiamaniere ni povus nin prezenti kaj kiel kontribui en la renkontiĝo, ni decidis akcepti la inviton. Ni, tio estas la rondo, ligata kun la klubo kaj redakcio de Varsovia Vento, samtempe ankaŭ anoj de la Varsovia Filio de PEA.



Esperantistoj dum la renkontiĝo. De maldekstre: Katarzyna Choroszucha, Tauno Nõulik el Estonio, Irek Bobrzak, Marek Mazurkiewicz (CC:BY-SA)

http://www.infoilawa.pl/aktualnosci/item/59992-wikipedysci-z-polski-i-swiata-spotkali-sie-w-ilawie-zobacz-zdjecia

Aperinta en 2001 Vikipedio, kion sendube vi konas, estas la interreta, plurlingva enciklopedio kun koncepto de libera verko. Ĉiu homo, ankaŭ vi, rajtas krei ĝian enhavon laŭ difinitaj reguloj kaj ĝenerale akceptataj principoj. Tamen, ne multaj el inter vi scias, ke ĝi apartenas al pli larĝa projekto, nome: Vikimedio. Do, krom ĉe la menciita enciklopedio, la

volontuloj grupiĝas ankaŭ ĉe la parencaj branĉoj kiel Vikivortaro, Vikilibroj, Vikifontaro, Vikicitaro, Vikinovaĵoj, Vikiversitato, kaj aliaj. Kadre de ĉiuj tiuj projektoj, oni povas realigi multajn utilajn ideojn, ekzemple je kondiĉo de la libera uzo prezenti galeriojn de la propraj fotoj kaj partopreni eĉ foto-konkursojn. La vikimedianoj formas do interesan rondon de homoj, en kiu iu okupiĝas pri birdoj, la alia pri fotoj, datumoj, historio, statistikoj, informoj kaj ankoraŭ alia, ekzemple, helpas ĉe la informatikaj problemoj. En la rondo, internacie kaj loke - pri kio iom surprize post akcepto de la invito ni eksciis – flame aktivas ankaŭ esperantistoj.

La Vintra Renkontiĝo de "Wikimedia Polska" okazis en la malgranda, fondita en 1305 de la kruckavaliroj, urbo Iława (Iŭavo), en la nord-centra parto de Pollando.



Ewa Caban ricevas premion

La organizantoj sukcese prizorgis patronecon de la urbestro, kiu fine de la renkontiĝo, mem disdonis premiojn por la partopenantoj, kiuj kontribuis al edit-vikipedia konkurso pri la urbo. Unu el la ĉefaj premioj gajnis ekzemple Ewa Caban, esperantistino el Katowice, kiu dum la renkontiĝo kreis la vikipedian paĝon en la lingvo internacia "Urbodomo de Iława". Cetere, agrabla novaĵo por ni estis la ekapero de aliaj esperantistoj, kiuj delonge kaj ŝate agas en la vikimedia grupo. Ni ĝojis des pli, ke unu el la organizantoj, kiuj okupiĝis pri programo de la vintra renkontiĝo, Leszek

Dobrowolski, estas ja nia delonga amiko, konata kiel kunorganizanto de la Artaj Konfrontoj en Esperanto "Arkones".




https://eo.wikipedia.org/wiki/Urbodomo_de_I%C5%82awa

Kompreneble, celo de la vintra renkontiĝo koncernis aferojn de la vikimedia societo kaj ties agadon. Tamen, en la programo aperis ankaŭ niaj kontribuoj, nome: rilatoj de Esperanto kun Vikipedio kaj komparo de la artikolaj kvalitoj inter paĝoj en la pola, germana kaj en Esperanto. Krome, nia eta grupo preskaŭ la tutan tempon laboris pri la novaj vikipediaj paĝoj, kiujn ni fondis, kaj kiuj ĝenerale koncernis iom forgesitajn siluetojn de esperantistoj el historio de la pola movado. Akcepto de la invito evidentiĝis do trafa decido. Ankaŭ, ĉar krom la integra celo dume ni havis eblecon observi membrojn de alia organizaĵo dum agado kaj kompari tion kun la spertoj de Esperantujo. Rapide ni venis al la konkludo, ke multon ni povas lerni de ili kaj ili de ni. Ekzemple, tre plaĉis al ni ilia malferma rilato al kritiko, celanta perfektiĝon, senĝena rimarkado de fuŝaĵoj, kaj kuna serĉado de konformaj solvoj, kio tiel ofte ja, en la esperantista medio, vekas konfliktojn. Anstataŭ tiel karakterizan batalon inter la “pacaj batalantoj” ni observis la laboron, plenan de entuziasmo. Bone videblis, ke por ili la celo estis pli grava ol la propraj aspiroj. Do ni lernu diligente tiun „oran” ekzemplon dum kuna agado.

Kompreneble, priskribi ĉiujn niajn rimarkojn ne eblas en eta artikolo. Certe, post tiu ĉi sperto, ni volas instigi vin turni atenton al la vikimedia rondo, ĉar ne nur la celoj, sed ankaŭ funkciado de la organizaĵo estas iel komparebla kaj sur multaj kampoj kongrua kun nia agado. Krome ni

konvinkiĝis, ke ankoraŭ restas multe por fari rilate al la reta enciklopedio pri kreado de novaj paĝoj kaj plibonigado de jam ekzistantaj. Valorus ankaŭ pli videbligi Esperanton ĉe la parencaj branĉoj kiel Vikivortaro, Vikidatumoj, ktp. Fine, ĉar mi menciis nian grupeton, mi deziras danki al Gosia Młynarska, Kasia Choroszucha, Tauno Nõulik kaj antaŭ ĉio al Marek Mazurkiewicz, kiu nome de la vikimedianoj invitis nin al la renkontiĝo, pro interese pasigita kuna semajnfino. Kaj dankojn meritas ankaŭ la organizantoj, kiuj tiel malferme nin akceptis, inter ili Natalia Szafran-Kozakowska, la ĉeforganizantino.

# Mojose

*www.pej.pl*

## PEJ-semajnfino en Triurbo!

27-a marto, 19:00 – 29-a marto, 13:00h.

Ni invitas vin al la unua PEJ-semajnfino. Ĉi-jare – ni renkontiĝu en Gdańsk kaj Sopot. Rezervu la lastan martan semajnfinon por la renkontiĝo ĉe la Balta maro – ni kune kontrolos la unuajn signojn de la printempo, vizitos interesajn lokojn kaj aŭskultos prelegojn preparitajn de niaj partoprenantoj.

---

*Tyron Surmon*

## Neĝkovrite en Pollando

La ĉi-jara JES (Junulara E-Semajno) okazis jarŝanĝe en Pollando, en la bela regiono apud la Ĉeĥia landlimo, en la Tabla Montaro. La nomo de la ripozejo mem estas “Szczeliniec” (en la vilaĝo Karłów), kaj mi ĝojis, ke finfine antaŭ la fino de la evento mi sukcesis prononci ĝin ĝuste!

La loĝejoj estis la plej bonaj, kiujn mi iam ajn spertis en junulara Esperanto-aranĝo, belaj lignaj kabanoj, kun bonega vido de la neĝo kaj montoj ekstere. Kiam mi estis malsana dum la unuaj du tagoj kaj devis resti la tutan tempon enlite, mi tre aprecis tion.





Pro tiu malsano kaj miaj devoj kiel TEJO-komitatano, mi, bedaŭrinde, ne povis ĉeesti tuton de la programo, sed la partojn, en kiuj mi ĉeestis, mi tre ŝatis. Unu matenon mi faris ekskurson al la montoj, kun profesia loka gvidanto kaj tradukado al Esperanto. En Britio niaj vintroj signifas simple multe da pluvo, do la vido de la montoj neĝkovritaj estis tre plaĉa. En unu el la noktoj okazis silenta diskejo, kie oni havas kapaŭdilojn kun tri muzikkanaloj kaj povas elekti, laŭ kiu muziko danci, kaj mi tre ĝuis tion – mi esperas ke ankaŭ aliaj junularaj aranĝoj prenos tiun ideon. Kaj mi volas mencii ankaŭ la koncerton de Tim Gallego. Ĝi estis elstara kaj mi antaŭĝojas aŭskulti liajn kantojn hejme, kiam ili finfine estos registritaj (iam en 2020, li promesis al mi).




Dum la evento estis pluraj memorindaj aferoj, kiujn mi volas kundividi. Iun matenon mi kaj amiko decidis promeni, kaj ni simple elektis direkton kaj sekvis ĝin. Ni promenis unu horon ĝis ni atingis arbaron kaj poste ludis flugdiskon (Frisbee) – tre ĝuebla mateno en belega ĉirkaŭaĵo. Alian fojon mi malkovris la novan fenomenon: post multe da vento, neĝo sekiĝas kaj solidiĝas, do se oni metas piedon surneĝe, ĝi ne tuj sinkas, sed unue rompiĝas glacia tavoleto – mi estis kiel iu infano, kiu vidis neĝon por la unua fojo.

Mi lernis multajn novajn kartludojn, enkondukis plurajn de miaj plej ŝatataj drinkoludoj al aliaj kaj ĝenerale feliĉe umis en la drinkejo kaj gufujo – kaj renkontis plurajn novajn amikojn, kiujn mi esperas vidi denove. Kiam mi estis tre laca post la komitatkunsido (ĝi daŭris naŭ horojn kaj finiĝis nur horduonon antaŭ la komenco de la silvestra balo), mi kunportis mian kafon al la diskejo. Kaj mi ŝatis la sperton esti tie gvidano ("DJ") la lastan nokton, malgraŭ la defioj de tiu rolo – seninterrete kaj devante klarigi al homoj, kial mi decidis ne ludi laŭ iliaj petoj. Sed ho ve!

Mi tre ĝuis la eventon, kaj du semajnojn post mia foriro, Esperantujo vere mankas al mi. Do, dankegon al la organizantoj de la ĉi-jara JES. Mi nepre klopodos reveni por la sekva jaro.

Fotoj de Ivo Miesen

La artikolo aperis en „La ondo de Esperanto" https://sezonoj.ru/2020/01/pollando-22/

## Raportoj, rakontoj

*Robert Kamiński*

### Parolantaj poŝtmarkoj




La „malkovritan poŝtkarton" la unuan fojon en la mondo uzis la poŝto de Aŭstrio-Hungario, en 1869. Ĝi estis 122x85 mm kartonfolio, kun presita flava poŝtmarko je la prezo de 2 krejceroj, kaj la surskribo "Correspon-denz - Karte" super la aŭstra emblemo. La paĝo kun presaĵoj estis origine la loko, destinita por skribi la nomon de la persono, al kiu estis sendita la poŝtkarto kaj ties adreso. Aliaj informoj povis esti skribitaj aliflanke de la karto. Poste, la lokon por skribaj informoj okupis ornamdesegnaĵoj aŭ fotoj. Skribitaj informoj translokiĝis al la adrespaĝo, dividita je du partoj.

Grava ŝanĝo estis enkonduko de algluataj poŝtmarkoj anstataŭ presitaj. Ĉi tiu ŝanĝo donis al poŝtaj klientoj la ideon aldoni sekretajn informojn, per la specifa metodo de algluado de poŝtmarkoj.

Estis kreitaj multaj “alfabetoj” por "Konversacioj helpe de poŝtaj markoj", kies signifon povis legi nur ensekretigita persono. Ĉi tiu metodo de korespondado estis ĉefe uzata de enamiĝintaj paroj. La mesaĝoj estis mallongaj kaj unusignifaj. Ekzemple: la poŝtmarko, fiksita horizontale en la supra dekstra angulo de la karto, signifis "signu rendevuon". La poŝtmarko, algluita diagonale en la malsupra dekstra angulo, signifis "skribu reen".

La poŝto toleris ŝanĝojn de la loko, kie oni algluadis poŝtmarkojn, kondiĉe ke ĝi ne kovris la adreson.

La konsilojn, kiel uzi tian korespondadon, oni povis trovi en la "instrukcioj", eldonataj sur specialaj poŝtkartoj. Ili estis presitaj de multaj bildkarteldonistoj, kiel: „Salon Malarzy Polskich” (Salono de Polaj Pentristoj) en Krakovo, aŭ la eldonejo "*Pocztówka*" (Poŝtkarto). Similaj instrufolioj estis eldonataj en la tuta aŭstra-hungara monarkio, same kiel en Rusio, Prusio kaj Francio. Pro tio, ke "poŝtmarkaj konversacioj", presitaj de diversaj eldonistoj, ofte diferencis unu de la alia, por legi la mesaĝon, sendinto kaj adresito devis uzi samajn instrukciojn.




Malgraŭ tiaj malfacilaĵoj, ĉi tiu bela korespondado, uzanta poŝtmarkojn, estis uzata dum multaj jaroj. En Pollando ĝi ankoraŭ troveblis meze de la dudeka jarcento.

Simile, oni sendadis mesaĝojn helpe de floroj. Ankaŭ por tio estis presitaj bildkartoj-instrukcioj "korespondado per floroj".

En ĉi tiu kazo, la floro, transdonanta la mesaĝon, devis esti propramane subskribita de la sendanto. Kun paso de la tempo, ĉi tiuj poŝtkartoj-instrukcioj malaperis, sed la kutimo sendi florbildkartojn restis. Konserviĝis ankaŭ la memoro pri signifo de kelkaj floroj. Sen instrukcioj ni scias, ke ekzemple miozoto (neforgesumino) estas peto por memoro, kaj penseo (frateto) estas signo de amikeco.






Bedaŭrinde, sendado de bildkartoj fariĝis malmoda. Hodiaŭ, la mistera parolo de poŝtmarkoj aŭ floroj estas anstataŭigata per SMS-aj, junular-slangaj mallongigoj, ekz. "nara" aŭ "siema", kaj rapido de la vivo kaj disvolviĝo de la sendrata telefonado malrapide forpuŝas la skribitan vorton.


---

*Robert Kamiński*

## Malfacila problemo - nekropoloj de la estonteco

Ne estas pli da spaco sur la tero, kaj la nombro de la mortintoj konstante kreskas. En la sekvaj 100 jaroj necesos enterigaj lokoj por proksimume 7 miliardoj da homoj.

Diversaj urboj alfrontas la problemon trovi spacon por novaj tombejoj. La problemo pli kaj pli serioziĝas, sed, bedaŭrinde, ankoraŭ malmulte oni parolas pri tio. Ni parolu pri la afero, por preventi la krizon. Ni havas pli kaj pli da problemoj por trovi lokojn, kiuj plene plenumas sanitaraj postulojn, kie povas esti aranĝitaj novaj tombejoj. En grandaj urboj foje tio simple ne eblas. Ĉiam aperas novaj konceptoj, kiuj devas esti esploritaj, por solvi


Kolumbario en Hong-Kong

gravajn urbajn problemojn.

La solvo ŝajnas esti vertikalaj nekropoloj, kiuj pli kaj pli aperas en diversaj landoj - de Brazilo ĝis Japanio. Israelo estas monda pioniro de konstruado de la vertikalaj tombejoj. Antaŭnelonge, proksime al Tel-Avivo, aperis multetaĝa konstruaĵo, apud grava ŝoseo. En Sudameriko, vertikalaj kolumbarioj estas konstruitaj antaŭlonge. En Honkongo, tombejoj estas metitaj sur krutajn deklivojn, kie iu ajn postulata konstruado estas nelebla aŭ senprofita.

Memorial Necropole Ecumenica en Santos, en Brazilo estis konstruita en 1983 kiel normala loĝdomo. Hodiaŭ, sur la 32 etaĝoj, ĝi povas teni cindrojn de 25.000 mortintoj.



Kolumbario en San Francisko

En Pollando necesas aktualigi la leĝon pri tombejoj kiel eble plej rapide, ĉar tiu, kiu funkcias, ne validas por kolumbarioj. La afero de disĵetado de cindroj ankaŭ estas nereguligita. Sekve de aplikeblaj regularoj, urnoj devas esti entombigitaj en tombejoj, sed estas neniu sekreto, ke iuj el ili ne troviĝas en nekropolo kaj cindroj estas disŝutataj en lokoj, konataj nur por proksimuloj de la forpasinto. Estas tempo enkonduki devigan akton, kiu fiksus entombigon de ĉiuj urnoj, permesus la disvastigon de cindroj, ekz. en la "ĝardenoj de memoro" aŭ permesus tenadon de urnoj hejme.


En la mondo estas aliaj solvoj por entombigoj. Ekzemplo estu Norvegio. Norvegaj tombejoj, estas trafosataj ĉiun 20-an jaron, por prepari lokojn por sekvaj entombigoj. La norvegoj ankaŭ rapidigas la biodegradan procezon por ebligi reuzadon de la tombejaj lokoj kiel eble plej rapide. Ĉe elektitaj punktoj, ili boras truojn en la tero kaj per speciala tubo ili enkondukas likvaĵon, bazitan sur kalko, kiu signife akcelas la biodegradadon de kadavroj.

Svedoj estas plej malfermitaj al ekologio. Ili inventis teknologion, kiun la mondaj amaskomunikiloj proklamis "la plej ekologia". Oni skribas pri la entombiga metodo, nomata angle "Promession", inventita de Susanne WiighMäsak. Ĝi havas tri etapojn. Unue oni frostigas la homan korpon en likva nitrogeno - je temperaturo minus 196 gradoj. Poste, per vibro, dispecigas la frostitan kadavron en malgrandajn kristalpecojn. Sekve - sekigas tiujn restaĵojn kaj elvaporigas akvon el ili (post forigo de metalaj elementoj.) La fina restaĵo devas esti "ekologia" pulvoro, kiun poste oni metas en biodegradeblan pakaĵon kaj entombigas en la teron. Oni supozas, ke post 12-18 monatoj homaj restaĵoj ŝanĝiĝos en kompoŝton, nutrante la vivon de plantoj laŭ la kristana principo: "el polvo vi ekestis, en polvon vi turniĝos".

Ĉi tio ne estas facila afero. Estas multaj solvoj. Ni, probable, ankaŭ devos baldaŭ komenci diskuton pri ĉi tiu temo en Pollando. Do, eble ĉi tiu voĉo ekigos ĝin?



La plej nova moderna tombejo-kolumbario en Tokio





*Evelyne Rotellini*

## Imitinda agado – Esperanto Plus




Permesu, ke unue, mi plezurege prezentu al vi Jean-Pierre MARCQ kaj min - Evelyne (Evlin') ROTELLINI. Ni havas farmbienon en Arieĝo (suda franca departemento, apud Pireneoj), en kiu ni akceptas infangrupojn. Por ekscii pli, vi povos viziti la retejon www.la-maraude.fr (nun nur en la franca).

Mi kaj Jean-Pierre estas iniciatantoj de la asocio "LERNEJO EN TOGOLANDO" (fr: Une école au Togo), kiu helpas Instituton Zamenhof, kiu situas en Lomeo.

Ni ankaŭ iniciatis kreadon de la asocio ESPERANTO PLUS, kies administrantoj ni estas - prezidanto kaj kasistino. Nun pri ESPERANTO PLUS. Ĝi estas asocio, kiu estis fondita en Arieĝo (sudparto de Francujo, apud Pireneoj). Ĝia celo estas disvastigi Esperanton internaciskale, danke al solidarecaj rilatoj.

Ĝi proponas :

- Estigi memstarajn grupojn de subtenantoj,
- Kunigi iliajn monatajn kotizojn,
- Subteni kompetentan esperantiston, kiu aktive disvastigas Esperanton.

Kiuj celoj?

- Disvastigi Esperanton,

- Ludi socian rolon pri senlima solidareco,
- Doni al ĉiu eblon agadi,
- Krei transversajn retojn.

Kial?

Por subteni spertan esperantiston (nuntempe en Afriko), kiu ne havas laboron, provizante lin per vivrimedo. Por ke li povu disvastigi Esperanton.

Kial "Esperanto Plus"?

La projekto "Esperanto Plus" rekte kongruas kun niaj afrikaj vojaĝoj kaj la interna ideo de egaleco kaj solidareco inter la homoj, pere de la lingvo Esperanto.

Laboro por Esperanto plej ofte postulas propravolan laboron. La evidenta bezono trovi vivrimedon, malhelpas tiujn, kiuj ŝatus dediĉi sin al la disvastigado de Esperanto.

Tiu situacio akras en kelkaj landoj, same kiel en la afrikaj landoj, kie ne sufiĉas aŭ simple ne ekzistas deca laboro. Tial ni imagis "Esperanto Plus".

Kiam oni konstatas la grandan diferencon inter salajroj en afrikaj landoj kaj en okcidentaj landoj, ni konstatas, ke eblas krei grupojn de 15 esperantistoj en Eŭropo kiuj kotizante po 10 eŭrojn monate ebligas al iu afrika kompetenta esperantisto perlabori sian vivon disvolvigante efike la lingvon. Profesiinte, oni aspektas pli serioze kaj pli libere oni povas dediĉi sian tempon al la celo. Tio vigligas Esperanton kaj implikas ĝin en sociaj rilatoj.

Agado de dunginto konsistas el disvastigo de Esperanto ĉirkaŭ li. Li instruas, prezentas Esperanton en radioj, universitatoj, lernejoj, ĵurnaloj, kongresoj, organizas renkontiĝojn, babilmanĝojn, prelegas... unuvorte li vigligas Esperantan etoson en sia medio. Krome, la kotizantoj kaj la dungito de ĉiu grupo povas regule kontakti unu la alian, interŝanĝi vidpunktojn kaj eventuale rapide reagi, se iu ne antaŭvidita problemo okazas.

Ĝis nun, laŭ ni, neniam tia projekto okazis en la mondo.

Nuntempe funkcias kvin grupoj Togolando kun Adjevi, Malagasio kun Henriel, Kongolando RDC Suda Kivuo kun Jeremie, Kongolando RDC, Norda Kivuo kun Honore Tanzanio kun la triopo: Paulo, Dismas kaj Mulele.

Ĉiumonate la loka laboranto sendas raporton pri sia agado al ĉiuj membroj de sia grupo, kaj kelkaj el ili eldonas ian gazeton, por informi la movadanojn en sia lando.

Bonvolu viziti retejon de la projekto:
https://esperantoplus.jimdofree.com/

*Robert Kamiński*

# Historio de rubaĵoj – la unua parto

Kiel vi povas diveni, la problemo pri rubaĵoj komenciĝis en la malproksima pasinteco (niaj prapatroj jam malpurigis sian ĉirkaŭaĵon antaŭ miloj da jaroj!). Malmultaj homoj scias, kiu inventis la sakon por rubaĵoj kaj kiam iu mafia familio unuafoje gajnis monon per rubaĵoj.

La plej multaj forĵetaĵoj estas organikaj restaĵoj, kiuj rapide putriĝas kaj ne damaĝas la naturon. Homoj plej ofte lasis restaĵojn de manĝaĵoj, fekaĵojn, cindrojn de fajroj, damaĝitajn armilojn aŭ laborilojn. Tio ne estis grandaj kvantoj. Kaj, cetere, parto de la forĵetaĵoj estis reuzita, ekz. fekaĵoj, bruligitaj en fajroj, provizis varmegon.

En la unuaj urboj en la Proksima Oriento, rubaĵoj estis ĵetitaj en kavojn ekster la urboj. La unuaj organizitaj forĵetejoj ekzistis en Kreto. Tie la forĵetaĵoj estis ĵetitaj en speciale preparitajn fosaĵojn kaj kovritaj per tavoloj de grundo. Tamen, pli facila maniero, estis ĵeti malpuraĵojn en proksiman sekan puton aŭ rekte sur la straton. Pro tio, ĉirkaŭ la kvina jarcento a.K., en Ateno estis kreita dekreto, deviganta loĝantojn elŝuti forĵetaĵojn en taŭgajn signitajn por tio lokojn, malproksimaj almenaŭ 1,5 km de la urbomuroj.

Simile estis en Romo. Tie, ĉiu el la loĝantoj estis devigita purigi parton de la strato antaŭ sia domo. Romianoj konstruis ankaŭ, kiel etruskoj, kloaksistemojn en siaj urboj. Forĵetaĵojn forveturigis al grandaj kavoj ekster la urboj. Ĉirkaŭ la dua jarcento a.K., aperis eĉ la profesio de "luanto de sterko". Tia homo forverturigis forĵetaĵojn de urboj al vilaĝoj, kie kamparanoj ŝanĝis ilin en naturan sterkon. Luktante kontraŭ la malpuraĵoj, la imperiestro Vespaziano impostis publikajn latrinojn, kaj urino de ili estis transigata al tanejoj, situantaj en la antaŭurboj.



## Rubaĵoj de mezepoko

En la mezepoko, la problemo de rubaĵoj fariĝis ankoraŭ pli granda. En urboj, kie estis breditaj porkoj, restaĵoj

kaj sterko kuŝis sur stratoj. Aldoniĝis la koto (la stratoj ne estis pavimitaj) kaj malpuran akvon oni kutimis elverŝi el domoj tra fenestroj. Tia kvanto de malpuraĵoj kaŭzis–tragikajn epidemiojn. Rubaĵoj en multaj mezepokaj urboj fariĝis serioza problemo (en unu el la francaj kronikoj de la 14-a jarcento ni legas, ke malantaŭ la muroj de Parizo konstruiĝis monto da rubaĵoj tiel alta, kiel la enireja urba pordego). La situacio en kasteloj ne estis pli bona, ĉar iliaj loĝantoj forigis la rubaĵojn ĵetante ilin eksteren, en fosaĵojn. Fine de la mezepoko, en kelkaj okcidenteŭropaj urboj, la situacio pliboniĝis. Ekestis specialaj "entreprenoj" por prizorgi forigon de forĵetaĵoj el la urbo. De tempo al tempo estis purigataj ankaŭ stratoj kaj putoj. Oni malpermesis ĵeti malpuraĵojn sur stratojn, en putoj kaj riveretoj (en la 15-a jarcento en Köln (Kolonjo) estis malpermesita porkobredado en la urbo, escepto estis farita nur por bakistoj kaj bieristoj). En Florenco*, ekzistis du metiaj gildoj, respondecaj pri pureco: malpuraĵ-kolektantoj kaj kloakpurigistoj. En Parizo ekzistis rubaĵista gildo.*

Eĉ pli da progreso okazis en la 16-a jarcento. En tiu tempo, en Parizo kaj Amsterdamo, aperis la unuaj publikaj rubaĵujoj, simple korboj. En Berlino estis enkondukita ordono, deviganta teni publikajn lokojn puraj. En la 18-a jarcento, oni kreis la unuajn organizitajn rubaĵejojn kaj en Parizo oni organizis regulajn servojn por forigi forĵetaĵojn kaj por desinfekti per kloro rubaĵejojn. En la 19-a jarcento, rezulte de la industria revolucio, la kvanto de rubaĵoj kaj restaĵoj kreskis. Centoj da industriaj entreprenoj, miloj da laboristoj, precipe en Britio, kaŭzis malboniĝon de la sanitara stato, precipe en urboj. Urbaj aŭtoritatoj komencis financi forigadon de rubaĵoj per siaj propraj buĝetoj. En Parizo, loĝantoj estis devigitaj ĉiumatene starigi antaŭ propraj domoj forĵetaĵojn, kiuj estis kolektitaj de municipaj servoj. En la jaro 1874, en Nottingham, estis konstruita la unua bruligejo de forĵetaĵoj. En 1852, en Berlino, aperis la unuaj necesejoj, lavitaj per akvo kaj ekde 1865 ekfunkciis la *Savarmeo*, kiu komence de sia agado okupiĝis pri kolektado kaj recikligo de forĵetaĵoj. La problemo tamen ne malaperis.



Simile estis en la unua duono de la 20-a

jarcento. Tiutempe oni rimarkis, ke per malpuraĵoj eblas... profiti. En la 1930-aj jaroj, unu el la mafiaj familioj en Usono fondis firmaon, kiu okupiĝis pri purigado de stratoj, prizorgado kaj utiligado de rubaĵejoj.



La kresko de rubaĵkvanto en la 19-a kaj 20-a jarcentoj estis kaŭzita ankaŭ pro kelkaj "inventaĵoj". En 1810 aperis la unuaj metalaj kaj poste aluminiaj skatoloj, en 1869 la unua plasta pakumaĵo. Feliĉe tamen, same rapide aperis solvoj, venkantaj malpuraĵproblemojn. En 1895 (laŭ aliaj fontoj en 1897) en Novjorko aperis la unua en la mondo recikliga sistemo, kreita de George E. Wargin (ĝia elemento estis, inter aliaj, apartigo de forĵetaĵoj). Meritas mencii, kiel flankan noton, ke kiel pionirojn de recikligado oni devas rigardi japanojn, kiuj kolektis makulaturon kaj recikligis ĝin en paperon jam en la 10-a jarcento. En la 20-a jarcento oni inventis plastan sakon por rubaĵoj. Ĉi tio okazis en 1950, fare de la kanadano Harry Wasylyk (polietilena sako). Amasproduktado de tiuj sakoj komenciĝis en la 1960-aj jaroj. Bedaŭrinde, kune kun plastaj sakoj por rubaĵoj, oni komencis amase produkti plastajn saketojn por ĉio, ankaŭ kiel reklamiloj.

---

*Robert Kamiński*

## Solaris kaj Pirx - „polaj” stelo kaj planedo!


Okaze de centjariĝo de sia ekzisto, Internacia Astronomia Unio (IAU), kiu kunvenigas profesiajn astronomojn el la tuta mondo, organizis agadon, nomatan IAU100, kiu estis parto de la konkurso de NameExoWorlds: ĝia celo estis nomumi elektitajn planedojn kaj stelojn. Ĉiu lando en la mondo ricevis unu planedan sistemon - kaj por tiu sistemo la lando aranĝis sian propran konkurson.

Pollando “ricevis” la sistemon de BD + 14 4559, en kiu estas planedo, malkovrita kiel parto de la serĉprogramo Toruń-Pensilvanio, por ekstersunaj planedoj, fare de la teamo de polaj astronomoj, al kiu

apartenas: prof. Andrzej Niedzielski, d-ro Grzegorz Nowak, d-ro Monika Adamów kaj prof. Aleksander Wolszczan.

En la unua etapo de la konkurso, kiu daŭris en junio kaj julio, ĉiu ajn povis sendi sian ideon pri nomoj por planedo kaj stelo. Konkursa komisiono ricevis pli ol 2.800 proponojn. La konkurenca komitato kontrolis ilin kaj elektis sep parojn de nomoj, kiuj estis en la dua etapo - tio estas publika interreta voĉdonado.

Interretaj uzantoj elektis nomojn, aludantaj al la fama sagao kaj libro-serio de Andrzej Sapkowski - **Geralt** kaj **Ciri**, Tiuj nomoj gajnis la plej multajn voĉojn - kaj ĉi tiu propono, kiel la ĉefa, estis plusendita de la pola komitato al la Internacia Astronomia Unio, kiu, laŭ la konkursa procedo, devis fari la finan decidon pri la elekto de nomo. Geralt kaj Ciri estis subtenitaj de pli ol 47.000 voĉoj, (pli ol 53 % de retumantoj).



Arta bildo de la ekstersuna planedo BD + 14 4559 b (Internacia Astronomia Unio)

Post diskuto inter du konkursaj komisionoj - pola kaj internacia, oni tamen decidis elekti la duan proponon: **Solaris** kaj **Pirx**, por kiuj voĉdonis malpli ol 16 %.

La nomo *Solaris* rilatas al la titolo de la romano de Stanisław Lem, la plej fama pola sciencfikcia verkisto. En la romano, eldonita en 1961, Solaris estas planedo, kovrita de grandega oceano.

Kunligita kun la verko de Lem estas ankaŭ la nomo *Pirx,* elektita por la planedo, malkovrita de polaj esploristoj. *Pirx* estas la kosma piloto – heroo

de de la rakontaro "*Opowiadania o pilocie Pirksie*" (Rakontoj pri la piloto Pirx" de Stanisław Lem.

Interretaj uzantoj voĉdonis ankaŭ por la paroj: **Swaróg** kaj **Weles** - slavaj dioj (voĉdonis 8 procentoj), **Twardowski** kaj **Boruta**, gravuloj el polaj fabeloj kaj legendoj, **Polon** kaj **Rad** - nomoj de kemiaj elementoj, malkovritaj de la pola fizikistino kaj kemiistino, dufoja Nobel-premiitino - Maria Skłodowska -Curie, **Piast** kaj **Lech**, - gravuloj el legendoj pri la komencoj de la pola ŝtato kaj **Jantar** kaj **Wolin** – nomoj, rilatantaj la polan marbordon.

La prezidanto de la nacia konkursa komitato, d-ro Krzysztof Czart ankaŭ rimarkis, ke la konkurso ĝuis konsiderindan intereson inter polaj interretaj uzantoj: la nombro de voĉoj de Pollando en la publika voĉdonada fazo - pli ol 88 000 - estis la plej granda inter ĉiuj landoj. Hispanio ankaŭ estis sur la podio, kun ĉirkaŭ 40.000 voĉoj kaj Ĉinio, kie estis registritaj ĉirkaŭ 30.000 voĉoj. Plie, polaj voĉdonoj konsistigis pli ol 21 procentojn de la tuta nombro de voĉoj dum la dua etapo en la mondo.

Solaris - videblas en la ĉielo el Pollando en la konstelacio Pegazo. Eblas ĝin observi vespere, per binoklo aŭ per amatora teleskopo. Grave estas, ke la nomoj, elektitaj kiel parto de la IAU100 NameExoWorlds-konkurso, havas oficialan statuson kaj estos uzataj paralele kun la sciencaj nomoj de la objektoj.

---

*uea.org*

## Deklaro de UE okaze de la 75-a internacia datreveno de la holokaŭsto, 27 januaro 2020

Hodiaŭ, kiam 50 ŝtatgvidantoj kaj delegacioj de la tuta mondo kunvenas en Yad Vashem, por mencii la 75-an datrevenon de la liberigo de Auschwitz kaj la viktimojn de la Holokaŭsto, UEA omaĝas al la memoro de la milionoj, kiuj estis mortigitaj pro sia genta aparteno kaj religio, inter ili ankaŭ multaj esperantistoj, inkluzive de familianoj Zamenhof. En tiu tago, kiun la internacia komunumo mencias, en la dato, kiam estis liberigita la ekstermejo Auschwitz, oni memoru la pasintecon kun instruo por la estonteco, ke neniam plu homoj estu persekutataj pro sia religia, genta aŭ kultura aparteno kaj la homaro atente respektu la homajn rajtojn je libereco, interalie de kredo kaj lingvo.

*Lidia Ligęza*

# Collegium Maius de la Jagelona Universtato en Krakovo

Komenco de la historio de la nuna Collegium Maius en Krakovo estas tre interesa. Tuj post fondo de la Krakova Akademio, en la jaro 1364, oni probable lekciis en ejoj de la reĝa kastelo sur Vavelo. Poste, la reĝo Kazimiro la Granda planis masoni sidejon por tiu ĉi altlernejo. Bedaŭrinde, neatendita morto de tiu reganto, en la jaro 1370, forstrekis ĉi tiun noblan intencon. Do, historio de la universitataj domegoj komenciĝas ĵus en la unuaj jaroj de la 15-a jarcento, kiam, laŭ la testamento de la reĝino Hedviga, la reĝo Ladislao Jagelo renovigis la kazimiran fondaĵon. Por reaktivigi agadon de la universitato, oni aĉetis de la familio Pęcherz el la vilaĝo Rzeszotary, domon, situitan en angulo de la stratoj Jagelona kaj Sankta Anna, masonitan el romp-ŝtono, kun la granda salono suretaĝe. En tiu ĉi granda domego, kiu povis esti restaĵo post la juda sinagogo, oni solene komencis la universitatan lekciadon la 26-an de julio en la jaro 1400.


Collegium Maius, Foto A. Sochacki

Dum la tuta jarcento, profesoroj de la altlernejo aĉetadis al la baza domo la najbarajn konstruaĵojn, kiuj, en la jaro 1468, estis ligitaj en unu tuton, ĉe Jagelona-strato, per ornamita orielo. La komplekso forbruliĝis en incendio en la jaro 1492. Baldaŭ komenciĝis la bazaj rekonstruaj laboroj. Karlo Estreicher opinias, ke arkitekturo de la nova Collegium estas apogita je la italaj modeloj, ĉefe je la arto de Leo Battista Alberti. La italaj arkitektoj partoprenis en konstruado de la krakova Collegium Maius, kvankam la ĉefa majstro estis Johano el Kolonjo. Fine de la 15-a jc, ekestis la monumenta domego, kies centron formas kortego, havanta malfrugotikajn, kristalajn volbojn. Komence de la 16-a jc, la majstro Marko trakonstruis aŭlon, eksan Teologian Lekciejon kaj, dum la jaroj 1515-1519, la majstro Benedikto alkonstruis, ĉe la suda flanko, la vastan bibliotekon kun renesancaj fenestroj. En Collegium Maius teretaĝe troviĝis lekciejoj kaj etaĝe Stuba Communis (la Komuna Manĝejo), biblioteko kaj loĝejoj por profesoroj. En angulo de la stratoj Sankta Anna kaj Jagielona, oni lokigis Teologian Lekciejon, la nunan aŭlon, kies grandaj frurenesancaj fenestroj kreas la ĉefan, arkitekturan akcenton. Tiun ĉi staton la kolegio konservis ĝis la 19-a jarcento. Ĵus, en la jaro 1819, oni komencis la multjaran renovigon, kiun, en la jaroj 1839-1856, gvidis la arkitekto Karlo Kremer, admiranto de la novgotika stilo. Post lia morto, la laboron kontinuis la aŭstra arkitekto Hermano Bergmann kun la partopreno de Felikso Księżarski. Rezulte de tiuj arkitektaj agoj, Collegium Maius ricevis novgotikan aspekton kaj provizon de la interno. En ĝi trovis sidejon Jagelona Biblioteko. Tiu ĉi la plej mal-nova pola libraro okupis tiun lokon ĝis la jaro 1940, kiam ĝi translokiĝis al la novkonstruita sidejo ĉe Mickiewicz aleo. En la jaro 1945, oni komencis la renovigajn laborojn ĉe la kolegio, kiuj daŭris ĝis 1964. Estris tiujn laborojn prof. Karlo Estreicher kaj planojn de la trakonstruo faris Alfredo Majewski. Oni forigis novgotikaĵojn kaj preskaŭ redonis al la konstruaĵo la iaman formon de la 15-a kaj 16-a jarcentoj. En ĝia interno oni aranĝis Muzeon de la Jagelona Universitato.

Collegium Maius (kun adreso Jagielona-str. 15) estas situita sur la malnova loko. Ĝia fasado etendiĝas laŭ la strato Jagielona. La plej okulfrapaj ĝiaj elementoj estas altaj fenestroj de la aŭlo, la bela orielo de Stuba Communis kaj gotikaj pintoj sur brikaj muroj, kiuj enhavas tie kaj alie fragmentojn de neĉizita ŝtono.

Trans la gotika portalo, oni eniras al la impona kortego, ĉirkaŭita per arkadoj. En la suda angulo ritmon de arkadoj finas la monumenta ŝtuparo, kondukanta al galerio de la etaĝo, situita sur muroj de la kortego. La enirejo de la galerio al la suda alo nomiĝas Porta Aurea (La Ora Pordego), pro la

ora kadraĵo, unu el la plej riĉe ornamitaj en Krakovo, dank' al la arko en formo de "azena dorso", komponita el ŝraŭbe kunvolvitaj, dikaj trunkoj kun folioj, finitaj per aĵura finialo. Pli supre ni vidas la fondtabulon de la studenta domo Jerusalemo, kiun fondis, en la jaro 1454, la kardinalo Zbignevo Oleśnicki. La nekonata artisto fiksis sur la tabulo lian portreton kaj modelon de tiu ĉi konstruaĵo. Super la enirejo al la eksa biblioteko, troviĝas interesa, ludanta horloĝo. Ĝi devenas de antaŭ la jaro 1465. En diversaj tempoj ĝi funkciis aŭ estis difektita. La nuna ĝia formo, el la jaro 2000, estas la kvara, farita perede komputilo, helpe de kiu moviĝas figuretoj kaj aŭdeblas du melodioj: fragmento de kortega muziko kaj la universitata himno *Gaudeamus igitur*. La figuretoj prezentas personojn, ligitaj kun la universitato, i.a. la reĝan paron Hedvigan kaj Ladislaon Jagelo, rektorojn: la sanktan Johanon el Kęty kaj Stanislaon el Skalbmierz. La mekanismo funkcias ĉiun duan horon de la 9-a ĝis la 17-a.




Meze de la placeto troviĝas la renesanca puto, restarigita post la lasta renovigo.

En Collegium Maius suretaĝe – en iamaj lekciejoj – nun oni fiksis malnovajn aparatojn kaj arojn de strangaĵoj kun la alkemia salono surfronte. Suretaĝe troviĝas parto de la Universitata Muzeo. La muzeaj

kolektoj estas ligitaj kun historio de la Jagelona Universitato kaj kelkaj devenas eĉ de la 15-a jc. La viziton oni komencas de Librejo, atingebla trans Porta Aurea. Ĉi tie oni aranĝas kunsidojn de la universitata senato kaj en la najbara Stuba Communis kunvenadas profesoroj, ankaŭ por elekti rektoron. La salono havas valoran barokan, gdansk-stilan ŝtuparon, kiu estas translokigita el Potocki-palaco en Krzeszowice. Apude troviĝas iamaj profesoraj loĝejoj, en kiuj oni konservas i.a. gotikajn universitatajn sceptrojn, donacojn de la reĝino Hedviga kaj de la kardinaloj Zbignevo Oleśnicki kaj Frederiko Jagelonido. La admirataj objektoj estas ankaŭ la ora globuso, nomata jagelona, fingroringoj kaj la mezepoka ĉeno de la princino Aleksandra. Ne nur fakulojn fascinas la kolekto de astronomiaj iloj, donacita al la altlernejo de Marteno Bylica, en la jaro 1492, kaj la netaksebla araba astrolabo, el 1054. La lasta, ebligita por viziti, salono, estas aŭlo; sur ĝiaj vandoj pendas portretoj de reĝoj, bonfarantoj kaj profesoroj de la Akademio. Ĉi tie, sur friso de la portalo, ni legas la sentencon, kiu ĝis nun estas devizo de la Jagelona Universitato: *Plus ratio quam vis* (Pli signifas racio ol forto).


Collegium Maius, Foto A. Sochacki

En la dua parto de Collegium Maius, troviĝas lokaloj kun malnovaj, fizikaj kaj kemiaj iloj kaj ankaŭ impona kolekto de globusoj, rilatantaj la Ĉielon kaj la Teron, i.a. troviĝas tie la famaj globusoj de Mercator, el la 16-a jc. La muzeo posedas ankaŭ aparataron, helpe de kiu Karlo Olszewski kaj Sigismondo Wróblewski, en la jaro 1883, kiel unuaj el la mondo, efektivigis statikan likvigon de la aero kaj ties komponantoj. La donaco de Ksavero Pusłowski konsistas el valoraj bildoj de Johano Matejko kaj Eŭgeno Delacroix, teksaĵoj de la princo de Créqui kaj kolektoj de porcelano. Krome, la muzeo posedas kolektojn de la antikva arto kaj de numismatoj. El la teretaĝa koridoro, oni povas eniri la kapelon al la Sankta Johano el Kęty, rektoro de Jagelona Universitato. Restaĵojn de lia renesanca tomboŝtono oni transportis tien de la preĝejo al Sankta Anna. La tabulo sur la vando memorigas restadon de la Sankta Patro Johano Paŭlo la Dua en tiu ĉi domego, en la jaro1983.

*Roman Dobrzyński*

# Jean Forge aŭ Jan Fethke



La pioniro de la Esperanto uzo en kinoarto estis Jan Fethke. Li naskiĝis en Opole, en 1903, kiam la urbo apartenis al Germanio. Lia patro estis germano, la patrino estis polino. La hejma lingvo de la familio estis la pola aŭ ĝia silezia dialekto, dum la publika lingvo estis la germana. Jan havis du fratojn, Stefanon kaj Edmundon. Ili ĉiuj junaĝe fariĝis esperantistoj, kunlaboris kun la nederlanda elstara esperantisto Teo Jung, kiu fondis la unuan Esperantan gazeton kun la titolo „Esperanto Triumfonta", poste „Heroldo de Esperanto". Ĝi aperadis ĉiun duan semajnon kaj famiĝis kiel unu el la plej gravaj periodaĵoj en la Esperanta movado.

Jan Fethke, kiel apenaŭ dudekjarulo, debutis en la Esperanta Literaturo sub la pseŭdonimo Jean Forge per la romano *„Abismoj"* (1923). Post unu jaro li eldonis *„Saltego trans jarmiloj*", kaj en 1931 *„Mr._Tot aĉetas mil okulojn".* Ĉiuj tri romanoj estis furore akceptitaj de la esperantistaro, sed la plej sukcesa montriĝis la lasta. Kvankam tiam ne ekzistis televido, Jean Forge prezentis en sia verko futurisman intrigon. La titola protagonisto Mr.Tot konstruis luksan hotelon kaj en ĉiuj ĝiaj ĉambroj instalis kaŝitajn filmkamerojn, kiuj registris kondutojn de siaj riĉaj gastoj, speciale tiujn skandalajn. La hotelestro, akirinte kompromitigan materialon pri siaj klientoj, ĉantaĝis ilin kaj tiamaniere fortune riĉiĝis. Tiun ĉi ŝablonon uzis post preskaŭ dudek jaroj la usona verkisto, George Orwell, en sia romano „*1984*", kies agado okazas en la lando de Granda Frato. En tiu fikcia lando oni uzis la „novlingvon", kiu, laŭ sia strukturo, estas Esperanto, kvankam la aŭtoro ne nomas ĝin tiel. Ĝis nun diversaj televidstacioj uzas la ideon de Jean Forge en siaj programoj *„Granda Frato"*.

Jan Fethke studis diversajn profesiojn, interalie kinoarton. En 1925 li eklaboris en Berlino, en la filmfarejo UFA – Universum Film A.G. En 1929 li provizis per Esperantaj subtitoloj la mutan filmon „Vojaĝo de patrino Krause en la feliĉon". Tio estis la unua uzo de Esperanto en la profesia

kinematografio. En 1934 li dublis en la Zamenhofan lingvon la germanan longdaŭran sonfilmon „*Morgaŭ komenciĝos la vivo*”. Tiu ĉi la unua uzo de Esperanto, kiel lingvo parolata en kinejo, montriĝis granda furoraĵo dum la Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo en la jaro1934. Emocie rememoras ĝin L.C. Zaleski-Zamenhof, kiu en Stokholmo, kiel naŭjarulo, la unuan fojon partoprenis Universalan Kongreson de Esperanto.

En 1935, Jan Fethke, malaprobante la reĝimon de Hitler, translokiĝis el Berlino al Varsovio kaj kontribuis al la pola kinematografio dekon da filmoj. La milito komplikis lian vivon. En la okupata Varsovio ne eblis okupiĝi pri kinoarto. Li serĉis laboron en Munkeno, poste translokiĝis al Prago, por realigi filmon pri tiu ĉi urbo. Tie li estis arestita de Gestapo, kiu kaptis en poŝto lian pollingvan leteron, kiun li skribis al sia patrino. En la laborkoncentrejo li ĝisatendis la finon de la milito kaj en 1945 revenis al Varsovio. Tie li ankaŭ suferis suspektojn pri kunlaboro kun germanaj okupantoj, sed sukcesis pruvi sian senkulpecon, danke al pluraj atestantoj.

En Pollando, ĉiuflanke detruita, Jan Fethke kontribuis al rekonstruo de la pola kinematografio. Li verkis dekojn da scenaroj por aliaj reĝisoroj kaj mem reĝisoris kelkajn filmojn, laŭ siaj scenaroj. Aparte ŝatataj de la publiko estis liaj komedioj. Mi memoras „*Irena, hejmen*”, en kiu ludis la senkomparaj komikartistoj + Irena Kwiatkowska kaj Adolf Dymsza. Same ridigis rigardantojn la komedia filmo „*Telefonu al mia edzino*„. Alia filmo, kiu plaĉegis al mi, estis „*La ŝipanaro*”, kiu prezentis malfacilajn kaj belegajn tagojn de navigado, kiujn pasigis gejunuloj sur la ferdeko de la velŝipo „Dar Pomorza” (Donaco de Pomerio).



Kiam mi malkovris la Esperanto-movadon en Pollando, en la jaro 1955, mi havis la ŝancon konatiĝi kun Jan kaj Edmud Fethke. Ili ambaŭ verkis la unuan post la milito manlibron de la lingvo internacia „*Mil vortoj de Esperanto*”. Edmund estis membro de LKK de la 44 Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio, okazinta dum la centa naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof, kiun UNESCO rekomendis celebri en la jaro 1959. Jan Fethke realigis filmon pri la kongreso „*Verda stelo super Varsovio*”. Ĝi estis en la pollingva versio prezentita en kinejoj. Tiam la televido nur ĝermis en Pollando. La ĉefa propaganda tubo de la reĝimo estis kinejoj. Antaŭ ĉefa filmo oni prezentis okminutajn filmaktualaĵojn. En tiu ĉi kadro estis prezentita „*La verda stelo super Varsovio.*” Rigardis ĝin milionoj da spektantoj. Ĝi estis bonega propagandilo de Esperanto. Tiu ĉi verko estis

esperantigita kiel la unua filmo post la dua mondmilito. La Esperantan version ĝia aŭtoro subskribis per sia pseŭdonimo Jean Forge, vaste konata en Esperantujo.




Jan Fethke inter esperantistoj dum la 44-a Universala Kongreso en Varsovio

En la jaro1960, Jan Fethke forveturis Berlinon, por ĉeesti la premieron de la germana filmo *„La mil okuloj de d-ro Mabuse*”, reĝisorita de Fritz Lang, surbaze de la romano *„Mr. Tot aĉetas mil okulojn*”. Post tridek jaroj, la verko de Jean Forge ne perdis sian valoron. Ĝia aŭtoro rifuzis reveni Pollandon, li „elektis la liberecon”. Tiel tiam oni nomis kontraŭleĝan fuĝon al la „kapitalista okcidento”. La tiama reĝimo reagis severe per la totala ekzilo. La nomo Jan Fethke estis malaperigita kaj ĉiuj liaj verkoj forviŝitaj, aŭ kaŝitaj sur arkivaj bretoj. La frukto de lia kinolaboro estis 12 artaj longaj filmoj, kiujn li reĝisoris, kaj 50 scenaroj en la germana, pola kaj franca lingvoj, kiujn li verkis por aliaj reĝisoroj. Jan Fethke – Jean Forge mortis en Berlino en 1980.

---

*Robert Kamiński*

## Adiaŭo de d-ro Józef Dąbrowski



La 30-an de decembro 2019, post longa malsano, mortis d-ro Józef Dąbrowski. Li, kune kun sia edzino Magda, lernis Esperanton en PEA filio en Łódź kaj aktive partoprenis en la kluba agado. Esperantistoj el Łódź memoras lin kiel simpatia kaj helpema homo, kiu volonte dividis siajn sciojn pri la historio de papero kaj pri aliaj siaj pasioj.

La doktoro Józef Dąbrowski estis elstara specialisto en la kampo de la papera produktado kaj teknologio, dungita en la Politekniko en Łódź, kaj

sekve en la Instituto pri Celulozo kaj Papero en Łódż, kie li faris multajn esplorajn laborojn. Plia pasio de d-ro Józef Dąbrowski, evoluinta dum la lastaj jardekoj, estis la historio de papera industrio en Pollando kaj en la mondo. Li estis aŭtoro kaj kunaŭtoro de multaj polaj kaj internaciaj eldonaĵoj, kaj en la jaroj 2004-2008 li estis prezidanto de la Internacia Asocio de Paperhistoriistoj. Dum jaroj li laboris kun bibliotekoj kaj arkivoj, kiam temis pri malacidigo de papero. Li aktive partoprenis en la ministeria programo „Acida Papero", kadre de kiu pilotaj studoj estis faritaj ĉe AP-Olsztyn (Ŝtata Arkivo).

## Lingvoscienca angulo

*Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*

### Rolvortetoj "*De*" - *De* rilate al verbo – dua parto

**Tempo**

Rilate al verbo, *de* povas montri la komencan momenton de daŭra ago aŭ stato:

Tempa *de* povas stari antaŭ esprimo de tempopunkto:

- *Li* ***laboras de la sesa horo*** *matene.*
- *Ŝi tion* ***kapablas de la naskiĝo****.*
- *Mi sciigas, ke* ***de nun*** *la ŝuldoj de mia filo ne* ***estos pagataj*** *de mi.*
- ***De la mateno*** *mi nenion* ***manĝis****.* Mi laste manĝis en la mateno. La vorto *mateno* estas ĉi tie uzata por tempopunkto, kvankam mateno ja havas daŭron.

Tempa *de* povas stari ankaŭ antaŭ esprimo de tempodaŭro. Tiam la daŭro de la tempa esprimo kaj la daŭro de la verba ago/stato komenciĝas pli-malpli samtempe:

- *Nur* ***de ses monatoj*** *mi* ***scias*** *la veron.* La sciado komenciĝis en la komenco de la sesmonata periodo.
- *Mi* ***konas*** *lin* ***de longa tempo****.*
- *Ĝi* ***komencas*** *sian ekzistadon nur* ***de hodiaŭ****.*

Por montri klare, ke temas pri tempo, kaj por pli precize montri la tempan nuancon, oni povas uzi *ekde* aŭ *de post*:

| | |
|---|---|
| ***ekde*** | = "de la komenco de" |
| ***de post*** | = "de la fino de" |

Se temas pri tempopunkto, apenaŭ estas diferenco inter *ekde* kaj *de post*, sed se temas pri tempodaŭro, la diferenco estas ja granda: *de post ŝia vivo = ekde ŝia morto*.

- ***Ekde ŝia vizito** li **ŝajnas** multe pli feliĉa.*
- *Mi promesas **ekde hodiaŭ** ne **fumi** plu.*
- *Multe **ŝanĝiĝis de post tiu tempo**, kiam ni kiel infanoj ludis unu kun la alia.*
- ***Estis** tre gaje **de post la subiro de la suno** en la daŭro de la tuta nokto, dum la plenluno disvastigis lumon preskaŭ tagan.*
- ***De post la tempo**, pri kiu mi rakontos al vi, **pasis** jam multe da jaroj.*

Bedaŭrinde, Zamenhof tre ofte uzis *de post* ĉe esprimoj de daŭro ankaŭ en okazoj, en kiuj ne vere temis pri la signifo "de la fino de tiu daŭro", sed simple pri tempa *de*. Iafoje la efektiva senco eĉ estis "de la komenco de la daŭro": ***De post la vespero** de la dek-kvara tago de la unua monato **manĝu** macojn ĝis la vespero de la dudek-unua tago de la monato.* Fakte oni manĝu **ekde** tiu vespero.

Zamenhof ofte skribis *depost* kiel unu vorton: ***Depost la tago**, en kiu Varsovio **salutis** la novan jaron, pasis ses semajnoj.* Nenio pravigas tian kunskribadon, sed se oni tamen uzas ĝin, oni atentu pri la akcento: ***dé**post*.

Zamenhof uzis ankaŭ *deloke de* kaj *detempe de* por fari distingon inter loka kaj tempa *de*, sed tiuj esprimoj ne estas oftaj:

- *Li **mezuris** la larĝon **deloke de la malsupra pordego** ĝis la ekstera rando de la interna korto.Jĥ.40*
- *Al tio [= longa kuŝado en la lito] ŝi **alkutimiĝis detempe de sia infaneco**.*

---

*Roman Dobrzyński*

## Politiko en gramatiko


En Pollando intensiĝas la batalo de virinoj por egalrajteco. Ili luktas tiel efike, ke en kelkaj sferoj, ekzemple en farmacio, oni trovas viron kiel raran specion de protektata besto. Mia la plej proksima apoteko entenas kvin giĉetojn, en kiuj priservas klientojn kvin sinjorinoj, vestitaj blanke. Ĉiu portas surbruste ŝildeton, informantan, kiu kaj kio ŝi estas, ekzemple: *Justyna Kowalska – magister farmacji.*

Post la sukcesa akiro de necesaj medikamentoj, mi kutimas ekzerci jenan eksperimenton: - *Szanowna Pani, czy Pani jest magistrem? (Estimata sinjorino, ĉu vi estas magistro?)*

*- Tak, jestem magistrem, magistrem farmacji (Jes, mi estas magistro, magistro de farmacio.)*

Tiam mi pardonpete klarigas, ke ŝi, kiel virino, ne povas esti *magister (magistro),* ĉar tiu ĉi vorto gramatike apartenas al la maskla genro en la pola lingvo kaj ankaŭ en la latino, kiu ja estas lingvo de farmacio. Virino ne povas esti *magister,* sed *magistra,* same kiel la historio en la fama sentenco: *Historia magistra vitae est.* Tiu ĉi citaĵo embarasas junajn farmaciistinojn. Ili verŝajne ne sufiĉe studis la latinon, ne komprenas la temon kaj konsideras min frenezulo. Tiuj pli aĝaj kaj pli saĝaj trovas min humoristo, ekridetas, sed emfaze ripetas: *Jestem magistrem!*

Do, farmaciistinoj ŝatas sian profesian titolon en ĝia vira formo *magister* anstatŭ la virina *magistra.* En la jaro 2004, la fama batalantino por la seksa egalrajteco - Izabela Jaruga-Nowacka respondecis en la registaro de SLD pri la rajtegaleco inter viroj kaj virinoj. Ŝi postulis, ke oni ne titolu ŝin *minister (ministro),* sed *ministra (ministrino).* La saman titolformon atribuis al si Joanna Mucha, kiu en la jaro 2011 fariĝis *ministra* de sporto en la kabineto de Donald Tusk. Sed tiu ĉi neologismo, kvankam korekta gramatike kaj adekvata al la femala genro, ne akceptiĝis sur la politika grundo. La aktuala registaro de PIS abundas je virinoj, sed neniu estas *ministra.* Ĉiu preferas la hibridan titolon *pani minister (sinjorino ministro),* kiun oni povas kompreni kiel *virin-viro,* alivorte hermofrodito.



La korifeo de la pola lingvistiko**, Jan Niecisław Baudouin de Courteney** asertis koncerne la gepatran lingvon: *Ni havas ne nur rajton, sed ankaŭ devon plibonigi tiun ĉi ilon akorde kun ĝia destino.1* Bone, sed kiel plibonigi la „ilon", se batalantinojn por la rajtegaliĝo dividas la kontraŭaj argumentoj? Unu grupo opinias, ke la egaliĝo postulas ŝanĝi masklajn vortojn en femelajn, rezulte la virino *minister* nomiĝu *ministra.* La aliaj

1 Małgorzata Kąkiel *Czy gościni się rozgości* Przegląd, nr 4/2020, p. 49

konsideras, ke ĝuste la masklaj titoloj respegulas la avancon de virinoj sur la nivelon, sur kiu situas viroj.

Ambaŭflankaj argumentoj ne koncernas lingvistikon, sed aliajn sferojn de la homa penso. Ĝenerale akceptebla estas la paro: *lekarz – lekarka (kuracisto – kuracistino),* sed tute ne: *doktor – doktorka (doktoro – doktorino).* La titolo *profesorka (profesorino)* aŭdiĝas en mezlernejoj, sed neniam en universitatoj kaj aliaj altlernejoj. Baldaŭ Pollando havos novan prezidenton. Se estos elektita Małgorzata Kidawa-Błońska, la unua virino sur tiu ĉi posteno, ŝi tutcerte prezentiĝos kiel *Pani Prezydent (Sinjorino Prezidento),* ĉar la femala ekvivalento de la vorto *prezydent* ne ekzistas. Oni povas ĝin fameligi kiel *prezydenta, prezydentka,* sed tio verŝajne ne okazos. Kial? Ĉar laŭ la supraj ekzemploj, oni povas konkludi, ke virinoj de altaj funkcioj ne deziras fameligi siajn titolojn, ili preferas estis „virinaj viroj”.

Ekzistas amaso da virinvortoj, derivitaj de iliaj virradikoj, kiuj reprezentas simplajn profesiojn ekzempe: *kelnerka (kelnerino), krawcowa (tajloristino), urzędniczka (oficistino)* ktp. En la socialisma epoko aperis novaj postenoj por virinoj, ekzemple: *traktorzystka (traktoristino).* Dume okazis multaj fiaskaj provoj de fameligo: *strzelec (pafisto) - strzelczyni (pafistino), mędrzec (saĝulo) - mędrczyni (saĝulino), gość (gasto) - gościni (gastino), chirurg (kirurgo) - chirurżka (kirurgino).* La vorto *marynarz (maristo)* fariĝas en la femala genro *marynarka,* kio signifas *jako; pilot (piloto)* transformiĝas en *pilotka,* kiu estas speco de ĉapo. La egaliĝo de viroj kaj virinoj kadre de la pola lingvo montriĝas malfacila tasko.

Jan Niecisław Baudouin de Courtenay estis la unua lingvisto, kiu science analizis Esperanton. Li skribis interalie: *La lingvoj evoluas laŭ la vojo, kiu daŭre kondukas al plisimpligo de iliaj strukturoj.(...) Esperanto respegulas la saman tendencon, sed celkonscie kaj konsekvence plirapidigita.*[2] La strukturo de Esperanto, inventita en la 19-a jarcento, daŭre anticipas multajn lingvojn sur la vojo de ilia evoluo. Sufiĉas mencii ĉiujn fleksiajn lingvojn, inter ili la polan. La tezon de la granda lingvisto konfirmas la supra teksto. Ĝi montras, ke en la pola lingvo ne estas facile transformi masklajn vortojn en la femalajn. Dum la saman derivadon ebligas senprobleme la genia Esperanta sistemo de vortfarado. Ĝi estas preparita eĉ por eventuala forigo de la celibato en la katolika eklezio kaj allaso de virinoj al la sakralaj funkcioj, aktuale rezervitaj nur por viroj. Karaj Legantoj provu femaligi la vortojn *ksiądz, kapłan, prałat, biskup, kardynał, papież,* Malfacila tasko en la pola lingvo, sed tute simpla en Esperanto: *pastrino, sacerdotino, prelatino, episkopino, kardinalino, papino.* Amen.

---

2 Roman Dobrzyński, *La Zamenhof-strato*, Varpas, Kaunas 2005, p.176

Ni publikigas la rakonton: “Bjalistoka fantazio”. premiitan en la Bjalistoka literatura konkurso - „Esperanto ligas homojn" – “Mi estas civitano de la mondo" – 2019, en ĝia originala formo sen korektoj de la Redakcio

*Viktor Lagutin*

## Bjalistoka fantazio

- Ĉu vi konsideras vin civitano de la mondo? - demandis min Beata.

Mi misglutis mian teon. Beata daŭre rigardis min. Hodiaŭ ŝia hararo estis blua. Ankoraŭ hieraŭ, mi pretas ĵuri, ĝi estis flava. Oni neniam sciis, kiukoloran humoron tiu knabino havos sekvonttage.

Kiu? - tusante, mi redemandis, kvankam bone aŭskultis ŝin.

Mi volis gajni tempon.

Nu, civitano de la mondo. Vi ja scias kion tio signifas. Jen, forprenu paneron de via vizaĝo, - Beata donis al mi buŝtukon.

Mi ruĝiĝis. Aŭ pro embaraso, aŭ pro la fakto, ke mi havis ne-niun respondon. Civitano de la mondo? Dio, certe mi sciis pri kio temis. Tamen... ĉu mi? Mi timis respondi stulte kaj elturniĝis:

- Kara Beata, pli bone, vi diru, kion vi pensas pri mi. Oni ne povas sin juĝi.

Ŝi enpensiĝis kaj lasis kuri siajn fingrojn en siaj- nuklee bluaj haroj. Ni sidis en „Esperanto" - la fama kafejo - sur bjalistoka foirplaco.

- Jes, - elparolis ŝi. - Mi trovas vin bona ekzemplo de mondcivitano.

Mi petis ŝin ekspliki sian respondon.

- Nun estas via vico paroli, - diris ŝi. - Unue, priskribu al mi - kion vi pensas pri civitano de la mondo. Ĉu tia estulo eĉ ekzistas?

La kelnero alportis tason da kafo por ŝi. Beata mendis duonlitron da buza por ni ambaŭ - onidire, populara drinkaĵo en antaŭmilita Bjalistoko. Malgraŭ, ke mi jam pasigis kelkajn monatojn en la urbo, mi ankoraŭ ne havis la ŝancon gustumi ĉion lokan.

- Mondcivitanoj certe ekzistas, - daŭrigis mi la konversacion.

- Kvankam estas pasporto de mondcivitano, oni ne bezonas paperojn por senti sin tia homo. Kompreneble, la plej grava kriterio estas

kredo je la planedo sen landlimoj: se oni nomas iun civitano de la mondo, li pretas rigardi la tutan globon sia hejmo.

- Ĉu sennaciulo?

- Jes, en iu senco. Esti sennaciulo ne signifas malestimon al sia hejmlando. Male, mondcivitano fieras pri la historio kaj atingoj de siaj lando kaj popolo. Tiu vorto komence timigis min, sed hodiaŭ mi komprenas, ke sennaciisma movado temas pri io alia. Tamen, sennaciismo kiel politika koncepto, iam populara kaj hodiaŭ reaktiviĝanta inter esperantistoj, ne interesas min.

Beata demandis, ĉu mondcivitanoj povas interesiĝi pri politiko.

- Kial ne? - mi respondis. - Gravas, ke ili ne juĝu aliulojn laŭ iliaj politikaj konvinkoj. Tio koncernas ankaŭ religiajn opiniojn. La mondbildo de vera mondcivitano ne toleras iujn ajn privilegiojn: rasoj kaj nacioj ne gravas. Homoj estas fratoj, la tero estas hejmo. Kaj pri sia hejmo oni zorgas, do mondcivitanoj pensas ne nur pri hodiaŭ. Ili volas lasi nian planedon vivebla por la venontaj generacioj.

Beata konsentis. Ŝi ridetis kaj por momento ni eksilentis. Mi rememoris kiel ni konatiĝis.

Mi alvenis Bjalistokon por volontuli en la loka Esperanto-societo antaŭ kelkaj monatoj. Kiel juna eksterlandano, dum la unuaj tagoj mi timis ĉion. Beata iĝis unu el miaj unuaj geamikoj, kiuj helpis alkutimiĝi al la nova cirkonstancaro. Tuj ekplaĉis al mi ŝiaj mal-konveneco kaj honesteco. Diverskolora hararo aldonis al ŝia bildo pozitivan frenezecon. Ankaŭ tion mi ŝatis.

Ni ĉiam parolis angle, kvankam mi jam sufiĉe bone komprenis la polan. Beata multe interesiĝis pri Esperanto kaj pensis, ke ĉiuj esperantistoj estas mondcivitanoj. Mi kontraŭis: bedaŭrinde, iufoje mi atestis paradoksan paroĥismon de karaj gesamideanoj.

La kelnero alportis nian mendon. Buza bongustis.

- Ĉu vi povas diri, ke mondcivitano apartenas al iu ŝtato? - demandis Beata. Ŝi klare ne volis ŝanĝi la temon de nia babilado.

- Eble, ne, - diris mi. - Ŝtatoj ja apartenas al homoj, ne kontraŭe.

- Tamen, ni bone scias, ke havi neniun civitanecon en la moderna mondo estas tute komplike. Ŝtatoj donas al homoj multajn avantaĝojn, certe. Aliflanke, ili ankaŭ senigas nin je multaj liberoj. Antaŭ ĉio, mondcivitano estas libera en sia kapo - de tie li devas forigi ĉiujn limojn.

Beata kapjesis. Ŝi diris, ke neniu mondcivitano povas esti antaŭjuĝulo. Li malfermiĝas al ĉio progresa kaj akceptas aĵojn, kiuj plibonigas nian

mondon. Ŝi ankaŭ diris, ke mondcivitano akceptas multnaciajn valorojn de monda kulturo kaj samtempe estimas tra-diciojn de ĉiu popolo.

- Mi redemandas vin, - Beata ludeme ridetis. - Ĉu vi konsideras vin civitano de la mondo? Almenaŭ la fakto, ke vi, juna ruso, estas volontulo ĉi tie, en Pollando, pruvas vian deziron vivi en la mondo sen limoj.

Mi ree ridetis kaj petis la kelneron porti nian fakturon.

- Mi diru jes, - kapitulacis mi. - Konsideru min civitano de la mondo, sed mi ankoraŭ devas labori super tiu honora statuso. Vin mi ankaŭ vidas kiel belan mondcivitaninon.

Ni ekridis kaj eliris la kafejon. Beata devis renkontiĝi kun sia familio. Estis en ordo, ĉar mi vere bezonis promeni sole. Ni adiaŭis. Mi alproksimiĝis al la monumento de juna Zamenhof. Oni instalis ĝin nur antaŭ kelkaj tagoj.

- Diru, Majstro, - ekbabilis mi kun la bronza knabo. - Kiu estas mondcivitano por vi?

- Hmmm..., - ekzumis la monumento. Mi eksaltis kaj ĉirkaŭrigardis. Ĉu iu vidis tion?? Preterpasantoj daŭre iris, ne atentante.

## Poŝtkesto

*Łukasz Żebrowski*,
Manĝi en varsovia "Manĝo"




En Varsovio, ekde 2014, laboras 4 veganaj manĝejoj/drinkejoj kun parte Esperanta nomo. Al la pola listo de ZEO-j oni povas aldoni 4 manĝejojn kun la nomo "MANĜO". Jen adresoj de manĝejoj kun tiu ĉi nomo: str. Żelazna 58/62; Hala Koszyki – str. Koszykowa 63; str. Dobra 52; kaj str. Bracka 20.

Retpaĝo de la manĝejo: http://www.mangovegan.com.pl/

Peto de Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto

Al landaj asocioj de UEA

Estimataj Samideanoj,

Koresponda Servo de JEI peras korespondadon inter japanaj kaj eksterlandaj korespond-dezirantoj. Ni petas vin anonci al viaj membroj pri nia servo jene: Se vi interesiĝas pri korespondo kun japanoj, bonvolu turni vin al: Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto

Skribante al ni korespondo-peton, bonvolu mencii vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn por faciligi nian laboron. Ni atendas vian afablecon plenumi nian peton.

Kun anticipa danko ni kore salutas vin.

Respondeculo de Koresponda servo de JEI Nobuo Sakurai

Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3, Tokio, 162-0042 Japanio. La 24-an de decembro 2019

# Kalendaro

## Popularaj Esperanto-aranĝoj en Pollando

kaj en najbaraj landoj en 2019 kaj 2020

| | | |
|---|---|---|
| 27.12-3.01 2020 | 11-a JES Junulara Esperanta Semajno en Karłów | Pola Esperanto-Junularo www.pej.pl |
| 14-15 marto 2020 | Internacia Ŝako-Turniro en Radom | Turniron organizas Akademio de Ŝakoj, Studenta Klubo "Roszada" kaj Pola Esperanto Asocio Filio en Radom |
| 17-19.04. 2020 | Esperanta Printempo en Szczecin 2020 *„Kastelo de Pomeriaj Princoj”* | Kristoforo – lobacz.k@onet,eu, tel. +48 601 725 335, Irena – irena-tomaszewska@o2.pl, tel. +48 502 327 701 |
| 23-28. 05.2020 | 5-a Interkultura Majrendevuo Wroclaw / Dolina Baryczy | Eŭropa Centro de Multkultura Edukado en Wrocław, informado.eo@gmail.com |
| 23–24. 05 2020 | 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj en Wrocław | Eŭropa Centro de Multkultura Edukado en Wrocław, informado.eo@gmail.com |
| 23.5. 2020 | 5-a Internacia Simpozio, Wrocław | Eŭropa Centro de Multkultura Edukado en Wrocław, informado.eo@gmail.com |

| | | |
|---|---|---|
| 21.06. 2020 | Montara Renkonto Czantoria Wielka en Beskidy Montaro | suchanekj@seznam.cz |
| 25.07-1. 08.2020 | 93-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda en Bjalistoko | Sennacieca Asocio Tutmonda kaj Bjalistoka Esperanto-Societo https://www.facebook.com/events/649411952208990 |
| 16.08. 2019 | Montara Esperanta ekskurso al monto Szyndzielnia kaj urbo Szczyrk apud Bielsko-Biała | Filio de Pola Esperanto-Asocio en Bielsko-Biała. Krystyna Zgud karad099@gmail.com |
| 8-18.08. 2020 | Kristana Kongreso en Legnica (kadre de 70-a KELI-kongreso) | Silezia Esperanto-Asocio. Kristana Esperantista Ligo Internacia https://keli.sea-vroc.eu/ |
| 2-10. 09.2020 | 53. Internacia Esperantista-Feriado en Lądek Zdrój | Silezia Esperanto-Asocio Teresa Pomorska, pomer@wp.pl |
| 11-13. 09.2020 | “Esperanto sur Strando” en Sopot | Triurba Esperantista Asocio TORENTO torentosopot@wp.pl https://sites.google.com/site/esperantowsopocie/ FB – Esperanto Sopot.pl |
| 18-20. 09. 2019 | 36-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto „Arkones 2020” en Poznań | E-SENCO Kultur-Socia Societo je la nomo Ludoviko Zamenhof en Poznań. http://www.arkones.org/eo/ |
| 9-11. 10.2020 | 44-aj Esperantistaj Preĝtagoj en Częstochowa | Pola sekcio de IKUE pomer@wp.pl |
| 11.2020 | Esperantista renkontiĝo GRUPE - 24 en Gliwice | PEA, filio en Gliwice, stanislaw.mandrak@gmail.com aŭ: staman@ka.onet.pl |
| 5-6. 12.2020 | 5-a Esperanta konkurso “Vortbeleco en Esperanto” en Wrocław | Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / informado.eo@gmail.com / Małgosia Komarnicka |
| 11-13. 12. 2020 | 21-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj en Bjalistoko | Bjalistoka Esperanta Societo kontakt@espero.bialystok.pl |
| 12.-01 2020 | 12-a JES Junulara Esperanta Semajno en | Pola Esperanto-Junularo www.pej.pl |

## Universalaj Kongresoj de UEA

| | | |
|---|---|---|
| 1-8.08. 2020. | La 105-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Montrealo (Kanado). | Universala Esperanto-Asocio uea.org |
| 17-24.07 2021 | La 106-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Belfasto (Nord-Irlando). | Universala Esperanto-Asocio uea.org |

## Popularaj Esperanto-aranĝoj en najbaraj landoj


| | | |
|---|---|---|
| 6-13. 04.2020 | 36-a Printempa Esperanto Semajno (PSI) 2020 en Wittenberg -Germanio. Granda internacia renkontiĝo por la tuta familio | Germana Esperanto-Asocio, Katzbachstrasse 25, 10965 Berlin, Germanio. |
| 01-10.05. 2020 | "Mirinda Lviv" en Lviv – Ukrainio | Volodimir Hordijenko, Kijivo volodomir@ukr.net |
| 13-21.07. 2020 | 43-a SEFT Somera Esperanto Familia/Feria Tendaro en Thomsdorf - Germanio | Vorsitzender Esperanto-Klub Schwerin André Christian Weber, gerd.gallium@mailbox.org |
| 18-26.07. 2020 | Somera Esperanto-Studado (SES) kaj Somera Esperanto-Programado SEP - La dua Esperanta kodummaratono *en* Kroměříž - Ĉeĥio | E@I, Februárová 2, SK-958 01 Partizánske, Slovakio ses@ikso.net |
| 17-20.09. 2020 | 2-a Eŭropa Civitana Renkontiĝo en Kassel - Germanio Laborateliero "Esperanto kaj Eŭropo" kadre de "Kleriĝo kaj Lingvoj" | w.guenther.esperanto@web.de |

# Gazetaro pri Esperanto-movado

## Pola Radio pri L. Zamenhof

Okaze de 160 naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof la 15-an de decembro 2019 Pola Radio preparis disaŭdigon pri iniciatinto de Esperanto Ludoviko Zamenhof. Ĝian enhavon oni povas trovi en retejo de la Pola

Radio: https://www.polskieradio.pl/39/156/Artykul/1179907,Ludwik-Zamenhof-i-jezyk-esperanto




# Forpasis

La 30-an de decembro 2019, en Łódź, post longa malsano, forpasis specialisto pri produktado de papero kaj esperantisto, d-ro inĝeniero **Józef Dąbrowski**. La entombiga ceremonio okazis la 9-an de januaro 2020 sur la tombejo, ĉe str. Szczecińska en Łódź.
Kun la granda malĝojo, edzino - Magda Dąbrowska

La 4-an de februaro 2020, en Poznań, forpasis esperantisto **Sławomir Sąsiadek**. La adiaŭa meso okazis la 7-an de februaro,
je la 11:15, en la preĝejo ĉe Rynek Wildecki kaj entombigo,
je la 12:45, sur tombejo ĉe la str. Bluszczowa en Poznań
Kun la granda malĝojo - filino, Hanna Sąsiadek-Bułat

Kun la granda malĝojo mi informas pri forpaso de **Zofia Gertruda Kowalczyk -** nia kara kolegino, longjara fervora esperantistino, agantino de la filio de PEA en Bielsko-Biała. Ŝi forpasis la 10-an de februaro 2020. La funebra ceremonio okazis marde ,la 18-an de februaro, je la 14.00 horo, en kapelo ĉe la evangelika tombejo str. Listopadowa en Bielsko-Biała.
Kun bedaŭro, en nomo de lokaj esperantistoj,
Bożena Gierula

# El la fotogalerio de Andrzej Sochacki

*Andrzej Sochacki*

## 3-aj Esperantaj Tagoj en Staszów, 05-07.05.1989

La aranĝon organizis E-Klubo en Staszów kun helpo de la loka Kulturdomo kaj la Urba Estraro. Solena inaugŭro okazis en la Kulturdomo. Partoprenis en ĝi 72 personoj el Łódź, Kraków, Warszawa, Tarnów, Busko Zdrój kaj gastoj el Rusio. La programo enhavis, inter aliaj, prelegon de la UEA ĉefdelegito Antoni Golonka, filmprezentadon „Esperanto" de la reĝisoro Roman Dobrzyński kaj koncerton de Georgo Handzlik. Ryszard Kwarciany gvidis E-kurson kaj ankaŭ koncertis vespere, ĉe tendarfajro.

Sekvontvespere okazis diskoteko. Ĉiuj partoprenis en la interesa ekskurso al la artefarita lago Chańcza, kaj al la historia urbo Szydłów. En la proksima al Staszów vilaĝo Kurozwęki, ni vizitis faman ĉevalbredejon, kie oni prezentis ĉevalojn al nia grupo.







Partoprenantoj antaŭ aranĝejo en Golejów



Salono dum prelego. Meze sidas Roman Dobrzyński, malantaŭ li Robert Kamiński.



Bona amika etoso ĉe tendarfajro. Kvara de maldekstre staras: Ewa Gorzka, Andrzej Brozi, Elżbieta Konik, Anna Wiśniewska, Ryszard Wiliński. En una vico de maldekstre sidas: Jadwiga Wilkowska, x, Ewa Jóźwiak, Mirosława Tomaszewska.


Ĉefdelegito de UEA Antoni Golonka

Partoprenatoj en ĉevalbredejo en la vilaĝo Kurozwęki kaj apud kastelo en Szydłów

---

Korekto

Legantoj anoncis al la redakcio, ke priskriboj sub la fotoj de Andrzej Sochacki ne ĉiam estas kompletaj. Bedaŭrinde, post multaj jaroj, ni ne ĉiam povas rekoni la personojn sur bildoj. Ni sukcesis rekoni kelkajn pliajn homojn sur fotoj el la numero PE 6-2019. Jen nia korekto.

Foto sur paĝo 36

Renkontiĝo en reĝa kastelo en Varsovio. De maldestre staras Andrzej Pettyn, Humprey Tonkin, Kazimierz Cłapka, Ewa Siurawska, Marŝalo de la Pola Parlamento Roman Malinowski.

Supra foto sur paĝo 38

Vicministro pri Kulturo Kazimierz Cłapka prezentas dokumenton pri fondo de la Fondumo Zamenhof. De maldekstre staras: Andrzej Pettyn, Kazimierz Cłapka, Humprey Tonkin, Ewa Siurawska

Meza foto sur paĝo 38

Ĵurio de poezia konkurso. De maldekstre sidas: Jerzy Rządzki, Elzbieta Malik, (x), Tomasz Bedyński

1859
ZAME
NHOF
2019















20-aj Bjalistokaj Zamenhof Tagoj 13-15.12.2019

**Ĉu vi aŭskultas elsendojn de Varsovia Vento - www.podkasto.net?**

# NIA FOTOGALERIO




JES (Junulara E-Semajnfino) 2019-2020 en Karłów apud ĉeĥia landlimo









La novjara Esperanto-renkontiĝo en PEA-filio en Bielsko Biała
la 19-an de januaro 2020

**Ĉu vi aŭskultas elsendojn de Varsovia Vento - www.podkasto.net?**